



«Le Groupe Esperanto du Maine» salutas vin !



Bonvenigaj vortoj

*«Mi neniam fiaskas,
aŭ mi venkas aŭ mi lernas.»*

Nelson Mandela

Enhavo

Poezia angulo.	pp.1-2.
Interkant-staĝo	p.1.
80a datreveno de Hiroŝima	pp.3-4.
Pri freskoj de Spay	p.4.
La ajlolea saŭco de José	p.5.



La Gem bedaŭras la forpason de
Joseph Cesbron.
Li esperantiĝis ĉe la anĝeva klubo.
De kelkaj jaroj li estis partoprenanta
niajn renkontojn.

INTERKANT-Staĝo

Vasilij EROŜENKO, 1860-1952, naskiĝis en Obuĥivka, Ukrainio. Li estis blinda pro morbilo ekde la 4-a jaraĝo. Li esperantiĝis inter 1908 kaj 1910. En 1912 li estis en Britio en gimnazio por blinduloj kaj en 1914 iris en Japanion. Li eksciis, ke japanaj blinduloj ofte memstariĝas per la metio de masaĝisto. Tie li studis la masaĝon. En Japanio li ankaŭ instruis Esperanton inter la blindaj studentoj. Li restis tie ĝis sia elpelo kiel rusa bolŝeviko en 1921.

En 1923 ĉe la UK en Nurnbergo li gajnis unuan premion por la plej bona prononco de Esperanto deklaminte sian originalan poemon «Ciganino».

Ekde 1924 ĝis 1951 li instruis Esperanton al blindaj infanoj. En 1952 li mortis pro kancero.

Tri gem-anoj kantas en la koruso Interkant kiu staĝas dufoje jare en la esperantista kulturdomo Greziljono, apud la urbeto Baugé (departamento 49) dum 6 tagoj. Ni kunvenis tie fine de aprilo, komence de majo kun nia ĥorestro Bernard kaj kiel kutime estis plezuro revidi nin por provkanti. Krome, la vetero estis tre agrabla, eblis tag kaj vespermanĝi ekstere kaj compreneble promeni, aŭskulti la birdojn... Kaj ankaŭ la 2an de majo, ni festis du datrevenojn en la grupo, gustumante kukojn kaj trinkante!

Samtempe kiel nia staĝo okazis bicikla staĝo kun flandroj, estis agrabla okazo por internacia etoso.

Do, se vi ŝatas kanti kaj ĝui belan etoson, venu, venu !

Antaŭdiro de la ciganino

Mia kara, mia bona,
mia nobla belulin'!
Ciganino diras veron,
ciganin' ne trompas vin.

Scias mi knabinajn revojn,
la sekretojn de la kor'.
Scias mi pri malfeliĉo,
scias mi pri amdolor'.

Kredas vi, ke la feliĉo
estas via vera sort'.
Kredas, ke belec' kaj amo
Akompanos vin ĝis mort'.

Kredas vi, ke ne ŝanĝiĝas
vira amo sub la sun'.
Kredas vi, ke la amikoj
ne perfidos sub la lun'.

Kredas vi, sed mia kara,
mia nobla belulin'!
Kredu min, mi diros veron,
ciganin' ne trompos vin.

Daŭra amo, daŭra ĝojo
estas vana belesper' :
En la mond' ŝanĝiĝas ĉio ;
Ĉio pasas sur la ter'.

Pro l' amat', pro la amikoj
Venos plej malĝoja hor'.
Kaj por ĉiam nur sopiro
restos en la juna kor'.

Mia kara, mia bona,
vin kompatas ciganin' :
Plej fidataj vin perfidos,
Plej amataj trompos vin.

Mia kara, mia bona,
kompatinda belulin'!
Ciganino vin kompatas,
sed ne povas helpi vin.

Ne ekzistas ja sorĉado
kontraŭ la fatala mort'.
Ne ekzistas talismanoj
kontraŭ malbenita sort'.

Sed memoru, ne forgesu,
mia kara belulin'!
Estas io en la mondo,
kio ne perfidos vin.

Tio estas la ponardo,
tio estas mortvenen' ;
kiam ĉio vin perfidos,
ili estos vera ben'.

Vi memoru, ne forgesu,
mia nobla belulin'!
En la venĝ' ponard' vin
helpos,
mortvenen' ne trompos vin.

Mia kara, mia bona,
mia nobla belulin'!
Ciganino diras veron,
ciganin' ne trompos vin.

Vasilij Eroŝenko



Poezia angulo



La eta Sejno

Nia humila eta rivero
Fluas preskaŭ silente;
Kun paca kaj milda sono
Ŝi ĉirkaŭiras la vilaĝon.

Salikoj kaj poploj
Kiuĵ proksimume samaĝas,
Kiel konataj najbaroj,
Susuras laŭ la bordo;
Kaj la murmuro de la akvoj
Akompanas la mallaŭtan voĉon
De la akrocefalo
Kiu nestas sur la rivero.

Tiel fluas kun dolĉa mieno,
Sen aventuro kaj sen bruo,
Promenante ĉirkaŭ la vilaĝo,
Nia humila eta rivero.

Henri Chantavoine

... Tiuj homoj strange mutaj malrapide alpaŝas. Mienoj kvazaŭ svenantaj, vagantaj rigardoj kolapsaj. Estas ja procesio de "mortintoj en Infero" (En tiu tempo, en sama horo, kiel ano de similaj procesioj de "mortintoj en Infero", ankaŭ mia edzino paŝadis sur tuj proksima ŝoseo.) Mi des pli ne povis kompreni. Bombo? Pulvejo? Ĉiu okaze devas esti ia granda eksplodo. Mi demandis al pluraj homoj venantaj el la urbo.

"Kie?"

"Antaŭ la stacio Hiroŝima "

"Kie? "

"En Danbara"

Ĉiu demandito respondas alian direkton. Tute alian direkton. Ne povas estis ke en tiom diversaj lokoj falis bomboj. Se estus eksplodinta pulvejo, tio povus esti, ĉar ni ne scias, kie ĝi estis. Sed tio ne klarigis la alflugon de B 29. Post tio, mi komprenis nenion.

Kiam mi atingis la domon de mia fratino -butiko de necesaj- mi estis surprizita de domaĝo de la domo.

Kvankam la domo staris ĉirkaŭ 3 kilometrojn for de la eksplodcentro, vitroj de ĝiaj frontaj pordoj estis tute detruitaj; restis neniuj pecetoj da vitroj ĉe kadroj, kaj pordoj mem estis tute kurbigitaj. En la interno, vendejo, loĝejo kaj kuirejo, estis en plena konfuzo, kvazaŭ kirlita de granda turnvento. Ĉio estis malorde disvolvita, alĵetita kaj kuŝis unu sur alia.

Prave, "nenie troviĝas loko por stari". Krom tio, falinta muro faras grandan truon, traboj falis, plafonoj pendiĝas kaj ankaŭ en la tegmento estas granda truo, el kie rigardiĝas blua ĉielo.

Neniu homo. Regas absoluta muta silento.

Ĉirkaŭirinte al la bonekonata malantaŭo de la domo, mi trovis la familion en la aerodefenda ŝirmejo. La bopatrino kaj infano estis sendifektaj. La fratino, kiu estis ĵetfalgita en najbara strato, ĵus revenis kun ĉifonitaj ombrelo kaj vestaĵoj. Mi rimarkis ke ŝi ŝveligas pro brulvundo sur vizaĝo, manoj kaj piedoj kaj ankaŭ de brusto al mamoj.

Pri la bopatro kaj bofratinoj, kiuj estis en la urbo por laborservi evakuadon de domoj, estis nenia informo. Baldaŭ la bofratineto, liceanino irinta por evakui domojn, revenis nudpieda kun nigre makulitaj vizaĝo kaj korpo duonnuda. Laŭ ŝia informo apenaŭ klariĝis la "fajrego" en la urbo.

"Kie estas ŝi..."

La vortoj de la fratino finfine vekis en mi homecan sentimenton. Subite min atakis timo pri mia hejmo. Mi elkuris la domon de la fratino, doninte afektitan kuraĝon al la maljunulo kaj knabinoj.

Forlasinta la domon mi suprenkuris sur Hiĵijama-Parkon ne malproksiman de tie. Tio estas monteto 70-80 metrojn alta, 2 kilometrojn for de la "eksplodcentro". Mi decidis en momento planon, ke mi unue de sur la monteto trarigardu stratojn de la urbo kaj poste starigu la postan agon.

Domoj sur la vojo estis klinigitaj aŭ disfalgigitaj, sed ne bruligitaj. Tio iom trankviligis min.

Sed en la momento, kiam mi kure atingis la supron de la monteto, mi ŝtone haltis tenante la spiron. La ŝoko en la momento estis tute ne komparebla kun tio en la unua fulmobrilo k. s. Ankoraŭ mi ne trovis taŭgajn vortojn por esprimi tiun ŝokon.

Mi ne scias, kioma horo estis tiam. Supozeble estis ĉirkaŭ tagmeze, Car mi pasigis la tempon suŝe e ĉe la fratino.



De la supro de la monteto oni rigardas centranj stratojn de Hiroŝima (la tutan cirkon de 2 kilometra radio ĉirkaŭ la "eksprocentro"). Kaj en ĝi troviĝas preskaŭ ĉiuj ĉefaj konstruaĵoj de armeaj. Ŝtataj, publikaj stitucioj, lernejoj, bankoj, kompanioj, magazenoj, loĝejoj Ankaŭ la universitato, en kiu estas mia laboratorio kaj ankaŭ mia luita domo, el kiu mi foriris tiun ci matenon kaj en kiu restas miaj edzino kaj infanoj.

(... tria parto en la sekvonta bulteno)

Pri freskoj de Spay

Je dek kilometroj de la urbo Le Mans, en la vilaĝo Spay, sur muro de la eksa stacidoma Kafejo « Café de la gare » troviĝas fresko, aŭtentika memoro de la komunumo pri famkonata loĝanto de Spay sinjoro Beunardeau kaj pri esperantaj aktivecoj.

Tiu fresko estis realigita en majo 1996. La longaj pasintaj jaroj defektis ĝin. Dum interparolado de la esperanta asocio de Le Mans kun la urbestro de Spay, tiu ĉi informis la asocion pri deziro de la komunumo: deloki kaj meti ĝin en la estonta komuna centro. Dank'al tiuj agoj la historiaj inskribaĵoj estos savitaj.



La ajlolea saŭco de José

La nomo "aïoli" devenas de la provenca "aïet" t.e. "ajlo" kaj "oli" t.e. "oleo", en la hispana "allioli". Ĉi tiu nutra saŭco datumas de antikveco kaj estis uzata de romianoj kaj egiptoj.

Ĝi estas ĉefe uzata en la mediteranea baseno. Ĝi akompanas multajn pladojn, inkluzive de rizaj pladoj (paeloj) kaj marmanĝaĵoj (sepio, kalmaro, ktp.).

Iun vesperon, hejme, restis iom da paelo, sed ni havis nek majonezon nek ajloleon por akompani ĝin. Mi mem proponis pretigi "hejman ajloleon".

Aperis problemo: mi ne havis la esencajn ilojn: pistujon kaj pistilon. Kion fari? Mi elturniĝis: mi uzis ajlopremilon kaj eltiris la pulpon el du ajleroj; fine mi dispremis ilin per kulero.

Post tio, mi ŝutis la dispremitan ajlon en rondan ujon. Mi enmetis du ovoflavaĵojn kaj batis ilin per forko. Mia miksaĵo taŭgis por du homoj. Mi verŝis flueton da olivoleo, kaj samtempe vigle kirlante mi densigis la miksaĵon. La ajloleo dikiĝis tiel, ke ĝi ne falus se mi renversus la ujon.

Ni gustumis kun sufiĉe da plezuro.

Malgranda konsilo: Se vi havas malfacilaĵojn por solidigi la oleon, helpos vin malgranda kulero da mustardo.



Ingrediencoj por 4 homoj :

3 ajleroj

2 ovoflavoj

Olivoleo

Salo,

pipro

Citronsuko,

mustardo (laŭvole)

Prepartempo: inter 5 kaj 10 minutoj



Le G.E.M (Groupe Espérantiste du Maine) a été créé en mai 1991 ouvrant son horizon au département de la Mayenne. Il a modifié récemment son intitulé et se nomme depuis « Le Groupe Espéranto du Maine ».

Ou

La GEM (Majna Esperantista Grupo) estis kreita en majo 1991, vastigante siajn horizontojn al la departemento Mayenne. Ĝi ĵus ŝanĝis sian nomon kaj de tiam nomiĝas "La Majna Esperantista Grupo".